Lord George Gordon Byron ,

Nokt' en la koro

tradukita de Leopold Blumental

Nokt' en la koro . . . la harpo kuŝas . . .
Vi tuj ekkantu, kantisto!
Se vi la kordojn de l' harpo tuŝas,
Vi miron faras, artisto.

Se kor' ankoraŭ havas esperon,
Per kanto ĝi revekiĝos;
Se la okulo kaŝis larmeron,
Denove ĝi eklarmiĝos.

Kant' via tondru mondan doloron!
La gajon mi ne komprenos . . .
Vi min plorigu, movu la koron,
Aŭ mia brust' ne eltenos.

Ĝi de suferoj longe manĝiĝis,
Silentan premis la ĉeno! . . .
La tempo venis . . . ĝi jam pleniĝis
Kiel vazet' de veneno.

Traduko de la Angla poemo "My soul is dark" de Lord George Gordon Byron *(∗1788-01-22 – †1824-04-18) en Esperanton de* Leopold Blumental *(Leo Belmont, ∗1865-03-08 – †1941-10-19).*

Arg-1018-2061 (2014-05-20 16:42:26)

Pri la tradukinto vidu la vikipediejn `http://eo.wikipedia.org/wiki/Leo_Belmont`. *La poemo-traduko troviĝas en* `http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php` *kaj en* `http://eo.wikisource.org/wiki/Fundamenta_Krestomatio/Nokt'_en_la_koro`.